# Trovu la bildkarton! – paroliga ludo

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Lerni por koncize paroli pri bildoj ekzerci, lerni simplajn bondezirojn, korespondan stilon. Esprimoj, vortoj pri sezonoj, vetero. |
| **Celgrupo:** | progresantoj, komenca periodo (jam konante bazajn vortojn, regulojn) |
| **Antaŭpreparo:** | 6 – 12 bildkarto pri la sama temo (ekz.: naturo: montoj, marbordo, somere, vintre, printempe, ktp. aŭ iomete malsamaj – pejzaĝo kaj urbopartoj) gluitaj sur granda kartono aŭ sur la tabulo (indikitaj per ciferoj). |
| **Tempo:** | 10 min. |
| **Ludantoj:** | ne gravas |

La tasko estas, ke ĉiu elektas po unu bildkarton, sed „kaŝe”, ke la aliaj ne sciu, kiu bildkarto estis elektita. Ĉiu skribas kelkaj frazojn – kvazaŭ al amiko, amikino, parenco, ktp. Poste, laŭtleginte la tekston de la karto, almenaŭ unu partoprenanto divenu, kiu estis la elektita bildkarto.
Estas utile antaŭ la ludo skribi simplajn frazojn sur la tabulon:

*Kara . . . ,*
*Mi pensas pri vi el . . . ,*
*Koraj salutoj el . . . .,*
*Vi certe envias min vidante* .. ktp.

Ekz.: Elektita bildo:
Bildkarto kun neĝaj montoj en la fono, verdeca kampo antaŭe kun floretoj.

*Teksto de la bildkarto:*

*Kara Marko! Ĉu vi imagas kiel mirindaj estas la neĝaj montegoj? Ni skiis dum la tuta tago hieraŭ. Estas tamen belega vetero, preskaŭ varme, ĉar jen jam floras la mi-ne-scias-kiuj floroj ĉirkaŭ nia hotelo. Kore mi salutas kaj kisas vin: Maria.*

Laŭtleginte ĉiujn, eblas komune taksi, kiuj tekstoj estis la plej spritaj, plej plaĉaj.